

Tagiĝo

N-ro
37

Cirkulero de Esperanto Junularo en ĈSR
Eldonas: Dům Osvěty P. Bezruče v Opavě.
Redaktas: Jan Werner kaj Drah. Kočvara,
Kamenec 251/3, OSTRAVA VIII, ĈSR

Januaro
1958

Al la legantoj!

komencante per tiu ĉi numero, la redaktado de la "Tagiĝo" transprenas de mi s-ano ing. Jan Werner, iama ĉefdelegito de la Esperantista Junularo. Mi kredas, ke li sukcesos fari nian cirkuleron pli alloga por la junularo ol ĝin faris mi, kiu per la aĝo ne apartenas inter la junularon. Por tiu celo li bezonas vian helpon: sendu al li raportojn, dezirojn, kritikojn. Malfacile estas eldonadi nian cirkuleron sen kontakto kun la legantaro. Precipe la lokaj delegitoj raportu ofte al sia regiona delegito kaj tiu regule al la redakcio.

Per la nuligo de TKKE en oktobro ĉesis ankaŭ mia funkcio de ĝia junulara sekciestro. Pri la junulara movado esperantista zorgos difinita membro de la kreota Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato.

Mi ne volas adiaŭi al vi, dezirante resti, laŭ la eblecoj, modesta kunlaboranto de nia Junularo.

Jaroslav Mařík

"TAGIĜO" devas esti spegulo de nia laboro!

Ĉeĥoslovaka esperantistaro jam antaŭ unu jaro spertis, ke nepre ne konvenas ĉesi en la intensa penado. Ni ne atendu de niaj superaj instancoj traktadon kavaliran. Ni ne risku seniluziigon kaj stagnon. La "afero Olomouc" restas en nia memoro same freŝa kiel la okazaĵoj en la jaro 1952. La anstataŭigo de TKKE pere de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato en nuna tempo ankoraŭ ne garantias fortan organizan leviĝon de nia movado.

La nomigo de la komitatanoj ne estas ankoraŭ aprobita kaj la programo, maniero de aktiveco, la rajtoj de ĈEK ne estas ankoraŭ konataj.

En kriza tempo ni vokis "Junularo, agu!" la junularo agos ankaŭ nun, en finalo de unu etapoj de nia batalo. Ni ne atendu manodorse, agu!

La movado bezonas fortajn grupojn. En la grupo estu centro de nia forto. "Tagiĝo" ligu vin laŭeble monate. Ne subtaksu ĝian rolon. Ĝi povas helpi en via agado kaj studado. Ĝi informas kaj instigas. Sed ankaŭ vi havas vian taskon, nome formi la redakcion pri ĉiu via sukceso kaj malsukceso. La kontakto devas multe pliboniĝi.

Krome ni atendas de vi iniciaton en la disvastigo de "Tagiĝo". Ni bezonas 500 abonantojn. Ĉiu el vi devas al ni helpi atingi tiun ĉi nombron. La jaro 1957 ne estu kaŭzo de riproĉoj kaj rifuzoj, sed ne plu tolerata fakto. Plibonigi la situacion en eldonado estas afero, kiu tuŝas ne nur la eldonanton kaj la redaktoron, sed ĉiun el vi, junaj esperantistojn en Ĉeĥoslovakio.

Mi volas ĉiam informi vin reale, prefere koncize ol pere de senenhavaj salon-frazoj. Realaj kaj korektaj estu ankaŭ niaj agoj. Ni havu idealismon en la koro, sed konsci, ke antaŭ la publiko pura idealismo sen racia bazo estas nepopulara. Neniam do kontentiĝu kun viaj scioj. Ĉiu klopodu atingi nian D-kategorion, rondon de junaj Esperanto-instruistoj. Mi deziras al vi sukceson kaj en la studado kaj en la laboro.

Jan Werner

INTERBABILADO OSTRAVA 6. -28. 10. 1956

Krom ostravanoj ĉeestis preskaŭ 100 ges-anoj. La programo estis plejparte labora. Dum la amuza vespero prezentiĝis la nova kabareta kolektivo de la Ostrava Junularo. Diskutitaj temoj:

1. E-kursoj en lernejoj. Farita grava paŝo por atingi kunligon de unuopaj lernejoj. La aferon gvidos s-ano Oldřich Schwetter. La kono nan cirkuleron pretigos s-ano Jaromír Štechr el Pardubice. (Vidu la specialan rubrikon en ĉiu numero - rim de red.)
2. Estis traktata Internacia Somera Esperanto – Tendaro 1957. Surbaze de la spertoj estis formulita propono por la venontjara ISET. Konkize: Por ĉiuj laboroj ligitaj kun organizo de ISET starigi centran preparkomitaton respondecan pri sia agado al la Centrejo kaj al la aranĝanta grupo. - Se estos pli da aliĝintoj ol da disponeblaj lokoj, oni prefere akceptu reprezentantojn de malfortaj grupoj kaj aliĝantoj por la D-ekzameno. - ISET estu sen A-kursoj. - Eksterlandanoj estu invitataj de la Centrejo pere de landaj Asocioj, por ke venu nur la eminentuloj.
3. Kursoj kaj la ekzamena komisiono. Kompili la ekzamenan demandaron aparte por la B, C, D-kursoj. - En la D-kurson kaj D-ekzamenon envicigi la pedagogikon. Elekti por tiu ĉi branĉo komitatanon, ellabori demandaron. - Por ISET-partoprenontoj, kiuj jam submetiĝis al la D-ekzameno, arangi Esp. seminarion. - Zorgi pri novaj instruantoj, eĉ specialigitaj por la superaj kursoj.
4. Kulturkonkursoj/lingva kaj literatura/laŭ opinio de ĉiuj ĉeestantoj estus utilaj por nia lingva kresko. (Jam envicigita en ĉi numero - red.)

Seminario kaj tradicia amuzvespero en Praha.

La Junularo de la EK en Praha aranĝis 26. - 29. 11. Esperantan seminarion kun prelegoj, kies liston ni publikigis en la pasinta numero. La prelegserion sekvis la tradicia amuza Nikolaa vespero 30. 11. kun artisma programo, tombolo, danco kaj disdono de donacoj pere de Nikolao.

En la artoprogramo la geedzoj Seeman, Eva Řiháčková kaj D-ro Pravoslav Sádlo prezentis la komedion de A. Seeman "Korespondu", premiitan en la Belarta Konkurso de la UK. Du membroj de la scenejo "Malá scéna" prezentis amuzan parton el "La Sinjorino Modo estras la epokojn" kaj la ensemblo "Kvítko", konata el la radio kaj televido, gajigis la ĉeestantojn per siaj kantoj. Por la tombolo venis donacoj el eksterlando (de G. Nilsson el Stokholmo kaj el Nederlando). Por la danco ludis orkestro de blindula Deyl-Instituto.

Tiu ĉi amuza vespero, aranĝata ĉiujare apartenas inter la plej sukcesajn. Partoprenis ĝin ĉ. 200 gesamideanoj el 31 lokoj, el kiuj la plej malproksima estis Košice (718 km).

En la sekvinta dimanĉo okazis junulara renkontiĝo. Inaŭguris ĝin junulara sekciestro s-ano J. Mařík, kiu aparte salutis s-anon J. Vítek, eksprezidanton de TKKE, s-anon R. Burda, prezidanto de MEM kaj malnovan veteranon de nia movado, s-anon Dron A. Pitlík. La ĉeestintoj honorigis la vivlaboron de ĵus mortinta pioniro de la Esperanta movado en niaj landoj, s-ano T. Čejka per silenta rememoro.

La ĉefan referaton prezentis s-ano Josef Vítek, kiu resumis kaj taksis la ĝisnunan aktivecon de la ĉeĥoslovaka esperantistaro. El liaj vortoj montriĝis, ke nia movado estas agopova. Transirante al la hodiaŭna stato de nia afero li konstatis ke konkordo kaj pacamo inter nia anaro estas bezonaj. La referato de s-ano J. Vítek rezultis en devizo: "Ni laboru en niaj grupoj!" Ni ne atendu miraklojn de la nova komitato. Ni devas intense labori en niaj grupoj kaj montri altan disciplinemon. Ni povas atendi, ke ĈEK (Ĉeĥoslovaka Esperanto Komitato) komencos funkcii post kelkaj semajnoj.

En la diskuto montriĝis, ke ĈEK ankoraŭ ne ekfunkciis, kvankam la agado de TKKE estis ĉesigita. Neniu el proponitaj membroj de ĈEK ĝis nun havas la dekretan. En ĈEK estos 2 reprezentantoj de Slovakio, kiu malgraŭ tio havos sian propran Komitaton. Neniu enlanda gazeto esperantista estos de ĈEK eldonata. En opaj regionoj funkcios Regionaj Esperanto-Komitatoj. SET kaj alia junulara aktiveco povos disvolviĝi.

S-ano Mařík raportis poste pri la junulara laboro laŭ informoj de la regionaj delegitoj. Estis anoncote, ke la problemoj rilate al SET kaj Tagiĝo estos solvataj en Brno, februare.

La kunveno montris ioman stagnon, kiu ekregis en niaj vicoj pro vakuo ekreginta post likvido de TKKE, sed estis samtempe esprimita emo al la nova laboro, post kiam la organizaj problemoj estos solvitaj. J. Mařík, V. Novobilský.

El la vivo de junularaj grupoj

Regiono PLZEŇ (RD: Josef Sladký, Holýšov, Výchledy 54)

PLZEŇ: la grupkunveno okazas ĉiumarde (19 h. en Český dvůr, Palackého nám. Je 18 h. okazas tie A-kurso kun 13 part., inter kiuj estas ankaŭ korea Studento. Tute mankas la lernolibroj. S-anino Šloufová gvidas kursojn C kaj D (gramatiko, historio, literaturo). En la metilernista hejmo de Pracovní zálohy komenciĝis en oktobro kvar kursoj de Esperanto kun 50 partoprenantoj.

Propagandan efikon havas du montrokesto: en Palackého nám. kaj en la ĉefa strato Tř. 1. máje (nacia entrepreno Arm) per meruito de Hořejší).

La grupo en Plzeň longe "pendis en la aero" ne trovante organizaĵon, kies fakrondo ĝi povus fariĝi. Ni do konsentas pri la titolo de raporto de nia regiona deslegito: "Grandega sukceso en Plzeň.", en kiu li komunikas: s-ano Kastner sukcesis en traktado kun la Uzina Klubo de la Uzinoj V. I. Lenin (ZVIL), post kiu la klubestraro akceptis 1.12. la esperantistoj kiel "interesrondeton. En la unua kunveno 6.12. estis elektita estraro, kies membroj estas plejparte junularanoj: prezid. Kastner (j-ano), sekr. Hořejší (j-ano), kasisto Reiser, protokolisto ing. Mlnářík, propagandisto Špaček.

DOMAŽLICE: Organizita movado ne ekzistas en la, distrikto, nur unuopuloj. Bone varbas novajn interesatoj la loka delegito s-ano Váchal, distrikta inspektoro pri kulturo. Li promesis al RD organizi tie kelkajn grupojn, kiam li finos siajn universitatajn studojn.

CHOTĚŠOV: S-ano Neoral el Nýřany komencis 25. 10. A-kurson kun 12 part. La kurson antaŭiris la propagando per flugfolioj, montrokesto, afiŝo kaj per diapozitivo en kinejo. La enhavo de montrokesto en ĉefa strato estas ĉiam modele aranĝita. Lernotekstoj por la kursoj en Chotěšov kaj Plzeň distajpis s-anino Kulíšková laŭ Kilian. En la junularprogramoj helpas s. Neoral, kiu frekventis kun eminenta sukceso la D-kurson en SET Popelná. 1957.

HORAŽĎOVICE. La E-rondeto ĉe la Kultur-Domo, (en la kastelo) estas plejparte junulara, ĝi kunvenas marde 18,30 h. Somere okazis kurso kun 12 lecionoj. 18.11. malfermita sesmonata kurso. La rondeto aranĝis prelegon de s. Vítek en Horažďovice kaj en Rábí. En novembro estis malfermita ekspozicio "70 jaroj de Esperanto", kiun vizitis ankaŭ 10 s-anoj el Písek.

PLASY. Laŭ raporto de LD Menšík ekzistas tie du esp. grupoj, en loka lernejo kaj ĉe la Domo de Kulturo. Ambaŭ laboras bone.

TACHOV. Ekzistas tie nur unuopuloj: Du kontaktitaj s-anoj ne povae transpreni la lokan delegitecon laborante en Praha.

LOKAJ DELEGITOj. en regiono Plzeň:

PLZEŇ: Věra Kulíšková, Palackého nám. 17.

DOMAŽLICE (Kdyně): Karel Váchal, Brnířov 68, p. Kdyně.

HORAŽĎOVICE: František Mudra, n-ro 264.

CHOTĚŠOV: Antonín Valta, n-ro 220.

PLASY: Gustav Menšík, n-ro 92.

RD J. Sladký eldonis la duan numeron de ciklostilita "Juna Esperantisto" en 200 ekz. - Ĉiuj anoj de la junularo subskribis rezolucion kontraŭ atombomboj/organizas s-ano R. Burda en la kadro MEM/.

REGIONO PRAHA (RD: Vladimír Novotný, Pol. věžňů 10, Praha 3, Restanta).

LITVÍNŮV. Regulaj kunvenoj ĉiumerkrede 19 h. en. Uzina Klubo. Vizito ĉirkaŭ 15 membroj. La elementan kurson por 12 part. gvidas s-ano J. Uhlík.

STRAKONICE. 9. 10. komenciĝis nova kurso. Perfektiĝemuloj havas apartajn kunvenojn. La grupo preparis programon por la Nikolaa Posttagmezo en Písek

TÁBOR.

Fondita grupo (ne plene junulara) ĉe OB. Nova kurso por komencantoj sub gvido de inĝ. Krajíc komenciĝis 13. 11. La sama samideano gvidas kurson en industria lernejo. LD: Lída Komzáková, Lomená 2014, TÁBOR 2.

PODĚBRADY. Regula kurso por komencantoj. Novaj membroj volonte vizitadas la kunvenojn. Plano de la grupo: ekspozicioj en ĉiuj lernejoj (en unu jam ekzistas), ekskurso al Brandys n/L., prelegoj de s-ano Vitek, kunvenaj prelegoj, Nikolaa Vespereto.

KARLOVY VARY. La grupo kunvenas ĉiuĵaŭde 20h., en la uzinklubo de ĉs. stát. lázně", domo Perun, tržiště 39. Regula vizito de 12 membroj kaj unu bulgaro. Dum somero vizito de kelkaj eksterlandanoj. Tri membroj estis eksterlande. Plano: novaj kursoj, raportoj pri la movado en du lokaj gazetoj, ekspozicietoj, kluba Nikolaa Vespero.

MOST. La grupo dumsomere aranĝis propran SET en Plasy apud Plzeň. 15.9. oni komencis novan sezonon en nova klubejo ĉe státní statky. Nikolaj Vesperetoj en Rudolice 30. 11. kaj en Most 7. 12. La regiona konferenco 8. 12. kun prelego de s. Vitek. Ekde 22. 10. elementan kurson 15-membran gvidas s-anino O. Závorková. La Progresintojn gvidas J. Uhlík. La vizito en ambaŭ kursoj preskaŭ 100%-a.

PÍSEK. Kursoj: 12 komencantoj, 10 progresintoj. Aranĝita Nikolaa Posttagmezo, kiun vizitis s-anoj el Strakonice, Horažďovice, Tábor. - La grupo kolektas subskribojn por la "Apelo de A. Schweitzer". LD: Libor Křivánek, Zborovská 1332, Písek.

PRAHA: Aŭtune denove komenciĝis regulaj mardaj kunvenoj kun la elementa antaŭkurso, gvidata de VI. Novobilský. Pri la seminario kaj la Nikolaa vidu apartan raporton.

Regiono PARDUBICE. (RD: Karel Franc, Pardubice, Dukla.)

CHRUDIM. La kurso por komencantoj daŭrigas sukcese.

LANŠKROUN. S-anino Naďa Jirečková gvidas du infanajn kursojn, Karel Štěpánek el Dolní Černá la daŭrigan.

PARDUBICE. Proksimume 25 gelernantoj el la 5-a ĝis 9-a klasoj de la 11-jara lernejo lernas Esperanton sub gvido de s. Štechr. Oni interŝanĝas fotojn, leterojn kaj desegnaĵojn kun kelkaj lernejoj en eksterlandoj. - La grupo kunvenas ĉiuĵaŭde en OB 3 en Jägermannova ul.

REGIONO BRNO. (RD: Olda Kaláb, Zbraslav u Brna)

TŘEBÍČ. Okazas unu A-kaj du B- kursoj. La grupo preparis solenan vesperon honore al Dro. L.L. Zamenhof, kaj la vesperon Kristnaskan.

BRNO. Junularo studas sub gvido de M. Lorková kaj A. Valjan. En EKB oni aranĝis la tutvesperan programon "Revuo teatra kaj recita" kaj la Nikalaan Vesperon. En EKB prelegis junularanoj M. Lorková kaj dr. Hort: "90 jaroj de la nacia artisto Petr Bezruč." Olda Kaláb prelegis je temo "J. A. Komenský, lia penado pri la paco kaj interkompreniĝo.

REGIONO OSTRAVA (RD: Drahomír Kočvara, Ostrava VIII, Kamenec 251/3)

Ostrava (VŽKG): Krom kutimaj merkredaj aranĝoj oni preparas monat-programojn:

18. 12. - Vespero honore al Dro L. L. Zamenhof.

15. 1. - Ĉe luna Asocio Esperantista (kabareto).

19. 2. - Variaĵoj el poezio kaj muziko.

19. 3. - ISETulaj vagabondoj (kabareto).

Ĉiuj programoj okazas je la 19,30h. en ZK. VŽKG "Zámek" en Ostrava-Vítkovice.

25. -29. 12. entreprenis la junularo aŭtobusan ekskurson al POLLANDO.

OSTRAVA--KUNČICE. Ĉe loka stacidomo estis fondita E-Rondeto pere de s. Fr. Strumínský, kiu tie gvidas la kurson por 15 komencantoj.

Ministlernejo HAVÍŘOV. Pro granda intereso devis J. Šlachta en la ministlernejo malfermi la duan interesrondeton por 20 gejunuloj.

HAVÍŘOV- Esp. rondeto ĉe Kleriga Kunularo. Estis elektita nova komitato. Nova kurso estis sukcese propagandita per gazetoj kaj radiostacio OSTRAVA. Du membroj vizitis Bulgarujon. Vizitis 2 eksterlandanoj; inĝ. Tadeusz ZASADA, WARSZAWA kaj Toni Griessenböck AŬSTRUJO. Kontraŭ nukleaj armiloj estis kolektitaj 557 subskriboj. Kurson vizitas 10 gelernantoj.

JAKARTOVICE. S. Hadámek gvidas kurson en loka lernejo por 18 infanoj kiuj korespondas kun fremdlandaj lernejoj.

PŘÍBOR. S. Satték gvidas kurson por 16 infanoj en loka lernejo.

DOLNÍ BLUDOVICE. La kurson por 35 geknaboj gvidas s. O. Schwetter en la okjara lernejo, per Ĉe-metodo. La rondeto partoprenis per la propra stando ekspozicion de pioniraj interesrondetoj en Český Těšín. Kaŭze de tio la loka muzeo postulis materialon por daŭra elmonro. -- Dum la distrikta konferenco de "Pionýr" estis plej aplaŭdata la raporto pri agado de la pioniroj-esperantistoj en Bludovice.

OPAVA. Ĉiumarde okazas kurso por 18 komencantoj sub gvido de s-anino Věrka Kořínková. En Domo de Kulturo estis aranĝita la Diskutvespero pri Esperanto. Prelegis s Jar. Kuzník, Inĝ. J. Werner kaj Dro Kempný.

VRATIMOV. Prof. Basl gvidas kurson por 23 lernantoj, plejparte slovakoj, en Spojová učňovská škola.

OSTRAVA-ZÁBŘEH. En la okjara lernejo instruas Esp.-on al 18 infanoj s. Vl. Slaný.

FRÝDLANT n/O. Nova grupo fondita fare de s. Ĉestmír Závodný, kiu ankaŭ instruas en bone prosperanta kurso kun 25 part.

Ĉu viaj kunvenoj estas enuigaj? Zorgu konsciencce pri la programoj!

Societa ludo LA ADVOKATO:

La gvidanto diru al ĉiu ludanto:

Vi estas akuzata, ke . . . " (sekvu ŝerco). Ekz. : Vi estas akuza, ke vi nesufiĉe riparas la ŝtrumpojn de via edzo," ktp. La dekstra najbaro de la akuzito notu la akuzon. Post eldiro de ĉiuj akuzoj ĉiam la dekstra najbaro funkcii kiel advokato kaj defendu sprite sian akuziton. La ludo tre taŭgas por la konversacia kurso.

SET en Hungarlando

Somere 1958 ni volas aranĝi Someran Esperantistan Tendaro por la junularo, verŝajne en la proksimeco de la urbo Esztergom /ĉeĥe: Ostřihom). La partoprenantoj loĝos verŝajne en studenthejmo kaj manĝos en restoracio. La regiono estas tre bela kaj oni povos aranĝi ankaŭ belajn ekskursojn. La tendaro daŭras ĉirkaŭ 10 tagojn. Ankaŭ kelkaj eksterlandanoj estos invitataj je nia SET.

En nia lando plialtiĝis la nombro de la Junularaj Esp. -fakrondoj kaj kursoj.
(El la letero de D-ro Imre Ferenczy, junular-estro de Hungarlanda Esp. -Konsilantaro).

Junulara seminario en JUGOSLAVIO.

La Jugoslavia Esperanto-Federacio organizis 12. - 18 VIII. 1957 en bela regiono apud Bled la I-an seminarion por junularaj gvidantoj, kiun partoprenis 27 gejunuloj el la tuta lando. La temoj estis:
1) Programo kaj enhavo de la junulara E-movado. 2) organiza strukturo de E-movado kaj aparte la junulara 3) Organizo de la grupa laboro. 4) Eksterlerneja aktiveco de junularo.

Post ĉiu prelego sekvis viglaj kaj profundaj diskutoj. -Posttagmeze oni ekskursadis. - La seminario signifas grandan paŝon antaŭen en la jugoslavia movado. (Jug. Esp.-isto. n-8).

Unuiĝo de Popoluniversitatoj en Eŭropo.

La konferenco de Popoluniversitatoj, okazinta pasintjare en la UNESKO-domo en Parizo, uzis kiel traduklingvon nur Esperantan. En la prezidantaro de la konferenco estis altaj funkciuloj de la franca ŝtato, UNESKO kaj popolaj universitatoj. Oni fondis Unuiĝon de Popoluniversitatoj en Eŭropo.

Esperanto en lernejoj de Okcidenta Germanio.

Laŭ cirkulero de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj oni nun instruas Esperanton en 22 lernejoj de Okcidenta Germanio.

3-a TEJO-Skiferio okazis ĉi-foje en kabano ĉe Tauplitz-Klachau en Stirio (Aŭstrio).

S k i r e s t a d o n en Adelboden 26. 12. 1957 – 5.1.1958 aranĝis Esperanto-Junularo de Svislando por 16-30 jaraj esperantistoj. Okazis skilifteskursoj, skikurso por komencantoj.

Esperanto en Nepalo.

En Kathmandu, ĉefubro de Nepalo, estas fondita Esperanto-Societo. S-ro Lakŝmi Prasas Devkota, edukministro de Nepalo, komencis lerni Esperanton. La Esperanto-Societo kreis sian bibliotekon, por kiu ĝi petas alsendon de Esperanto-libroj kaj broŝuroj.

Libervola Internacia Civila Servo.

Oni intencas starigi laborkampon dum la venonta somero, kies la ĉefa lingvo estus Esperanto.

La laboro, plejparte mana, estas senpaga, ĝi ebligas strebadon al rekonstruo kaj frata interhelpo. La laborkampo estos eble elektita en Pollando, kiu estas atingebla de orient- kaj okcident-eŭropaj gesamideanoj. La L. K. okazos certa dum aŭgusto. La interesiĝantoj sin turnu al la adreso: 77 Jean Jaures, CLICHY (Seine), Francio.

Ŝi timis viziti nin.

En "Informátor Havířova" ni legis artikolon pri vizito de unu aŭstria samideanino en Havířov, la plej juna urbo de Ĉeĥoslovakio. Ŝi estis ravita per tiu ĉi novelkreskinta urbo apud Ostrava kaj ŝi multe rakontis pri profunda malagordo inter okcidenta propagando kaj la realo en Ĉeĥoslovakio. La timo antaŭ vojaĝo estis do superflua. Venontan fojon ŝi venos inter nin kun plena ĝojo.

"Heroldo de Esperanto" kaj SET.

En la pasinta numero ni konstatis la fakton, ke "HdE" jam la trian jaron ne envicigis la senditajn raportojn pri niaj stud-tendaroj. Ni do estis agrable surprizitaj, leginte en la n-ro 15 sur la 1-a paĝo kiel ĉefraporton "Esperantistaj stud-tendaroj en Ĉeĥoslovakio". - Al niaj legantoj ni devas diri, ke la citita raporto estis kompilita de la redaktoro de "HdE" el nia artikolo sendita jam en junio, kaj el raporto sendita en aŭgusto. Tiu cirkonstanco kaŭzis, ke la raporto "HdE" ŝajnas iom nekompakta.

Legu "Bultenon de EK Praha"

En la jaro 1958 centra presita Esp. -gazeto en ĈSR ankoraŭ ne ekzistos kaj la "Bulteno de EK" do devos daŭrigi sian rolon de tutŝtata informilo. En ĝi denove aperos multaj informoj kaj artikoloj pri la ĝenerala movado en ĈSR kaj en la eksterlando. La Bultenon ricevas senpage ĉiu, kiu aliĝas kiel membro de EK Praha. Petu la aliĝilon kaj poŝtpagilon de Jar. Šustr, Dlouhá 10, Praha 1.

Ni uzas la okazon por danki al la Esperantista Klubo ĉe OB-ONV Praha 2 por ĝia bona kompreno al bezonoj de la junularo, kiujn ĝi montris kaj ideo kaj materie.

Konsciu, ke fine de februaro okazos en BRNO la tradicia MASKOBALO kaj la junulara kunsido.

Gramatika anguleto.

Instruon ni hodiaŭ ĉerpis el la letero sendita de R. Hromada al la partoprenantoj de Esperanto-seminario en Ostrava:

Malgraŭ ĉiuj klopodoj la facila lingvo Esperanto estas ofte uzata tiel kriple, ke pli granda severecco estus rekomendinda. Antaŭ ne longe mi ricevis por kontroli presprovaĵon, kie krom alie svarmas la malfeliĉa "eĉ" sur tiuj lokoj, kie la ĉeĥa lingvo diras "i", do eĉ sur tiuj lokoj, kie la ĉeĥa "i" ne signifas "ba i", sed simple "kaj" aŭ "ankaŭ" aŭ "kaj ankaŭ". Krom tiu "eĉ" estis tie pluraj eraroj, kontraŭ kiuj ni batalas jam jarojn. Ĉu tiu batalo restos vana?

Kion skribas al ni la amikoj.

Julie Šupichová: Al Esperanto-Junularo.

Estimataj samideanoj kaj amikoj, kun vera plezuro mi tralegis viajn priskribojn en la Tagiĝo kaj en Heroldo de Esperanto pri viaj konataj Someraj Tendaroj, kiujn vi nunjare aranĝis.

Gravan laboron vi entreprenis komencante arigi novajn adeptojn de la Verda, Stelo kaj nian junularon, por doni al ili ne nur amuzon, sed ankaŭ necesan instruon. Tre serioza kaj fruktodona kampo!

La admirinda kaj meritita sukceso de via penado estas kaj ĉiam estos bona instigo ankaŭ por la alilandaj samideanoj, kiuj certe ekiros vian vojon. Via konscia kaj oferema laboremo entuziasmigos multajn.

Dankon al vi kaj pluan sukceson! Ne ĉesu – iru ĉiam kuraĝe antaŭen!

50 jarojn aktiva esperantistino.

La granda amikino de la esperantista Junularo, nia estimata samideanino Julie Š u p i c h o v á, instruistino e. p., atingis en 1957 tre signifan laborjubileon: 50 jarojn da pionira, diligenta laboro sur la kampo de la Internacia Lingvo. Dum tiu duona jarcento ŝi fondis kelkajn rondetojn, precipe la Rondeton de esperantistinoj en Praha, gvidis sennobrajn kursojn de Esperanto, speciale en gazetoj, faris seriojn de prelegoj, ankaŭ en la radio, verkis plurajn lernolibrojn de Esperanto kaj legolibrojn, inter ili ankaŭ por la junularo, skribis kelkajn informajn librojn por la ĉeĥoslovaka publiko kaj

publikigis centojn da informoj en gazetoj. Malgraŭ sia alta aĝo kaj grava malsano daŭre kulturasis anatan kampon. Antaŭ nelonge aperis prese en Jugoslavio ŝia nova legolibro.

La esperantista junularo en ĈSR vidas en s-anino Julie Šupichová brilan ekzemplon de senlaca laboremo por Esperanto kaj por la paco kaj ĝi kore salutas ŝin, dezirante al ŝi bonan sanon por la pluaj jaroj.

Letero el Svedujo.

Karaj Geamikoj!

Dum tiuj ĉi malhelaj kaj malvarmaj tagoj, kiam nura aspekto de la naturo premas la animon kaj plifortigas ceterajn zorgojn, miaj pensoj tre ofte flugas al belaj someraj tagoj, kiujn mi pasigis en SET en Popelná. Multfoje mi ankoraŭ hodiaŭ, kiam laborego tro lacigas min, mi ĉerpas novajn fortojn el rememoro pri tiuj tagoj. Forgesita jam antaŭ longe estas la pluvo, sed la gajan medion, la bonan kamaradecon mi neniam forgesos.

Por mi, kiu ofte cerbumas pri aktualaj problemoj en la mondo, estis tre grava afero havi okazon jam dufoje partopreni vian tendaron kaj persone sperti vian celkonscian laboron por kulturo, paco kaj amikeco inter la popoloj. Efektive vi tre malofte uzis tiujn vortojn mem, sed viaj agoj, via grandega gastamo, via amika, eĉ kelkfoje tro estimplena sinteno al eksterlandanoj, viaj klopodoj montri al tiu la ĉarman naturon de via lando kaj prezenti al li la trezorojn de la ĉeĥoslovaka kulturo, tio ĉio faris al mi neforgeseblan impreson kaj pli bone ol povus fari amaso da vortoj, montras la celon de via agado. Kaj mi tre alte taksas tiun agadon, ĉar la porpaca laboro celante krei amikecon, kunlaboron kaj interkomprenon inter ĉiuj honestaj homoj en tuta mondo, tio en la nuna tempo estas la plej grava tasko de nia generacio. Estas tasko, kiun ni nepre devas solvi. Kaj mi esperegas, ke oni ĉie en la mondo montru pli grandan komprenon por via maniero ĝin solvi.

Al via plua laboro mi deziras plej bonan sukceson. Mi scias, ke vi jam fervore diskutas eventualajn ŝanĝojn kaj plibonigojn. Tamen mi povas aserti al vi, ke jam tio, kion mi spertis, estis tiom bonega, ke vi ne bezonas timi tion prezenti al kritikemaj eksterlandanoj. Kontraŭe, tiuj lastaj certe havas multon por lerni de vi. Mi ankaŭ ege deziras, ke ni esperantistoj ekster Ĉeĥoslovakio, baldaŭ povos havi okazon renkonti kelkajn anojn de SET en nia lando. Povos fariĝi tre fruktodona kunlaboro. Kun plej varmaj kaj elkoraj salutoj

de via G u s t a v N i l s s o n .

KONKURSO DE "TAGIĜO"

Nia konkurso konsistas entute el 6 taskoj lingvaj kaj literaturaj. Ni publikigos po du taskoj en la n-roj januara, marta kaj maja. Partoprenontojn ni taksos laŭ la lingvaj kategorioj B, C, D. La konkurson povas partopreni ĉiu leganto de Tagiĝo. Ĉiun taskon ni taksos aparte, sed la fina premio okazos nur fine de junio. Premion povas ricevi nur tiu, kiu estos sendinta almenaŭ 3 ellaboritajn taskojn. Unuopaj poentrezultoj estos adiciataj. La taskojn ellaboru sen helpo de viaj amikoj! Ni fidus je via honoro.

Por venkontoj ni preparas IQ premiojn! La ellaboraĵon sendadu al la redaktoro J. Werner (Ostrava-Kunčice, Na Lachu 6.)

La taskojn 1. kaj 2. forsendu ĝis fino de februaro. -

Tasko 1-a: Esperantigi ĉeĥan tekston.

Kategorio B: fragmento el "pohádka o pohádkách" de Karel Schulz:

Tento vodník nebyl ani starý, ani mladý. Bydlil v tůni pod slunečnou strání blízko mlýna a sám ani nevěděl, kdy se sem nastěhoval. Líbilo se mu zde tak, že by nebyl měnil ani za tisíc hrnků s dušičkami. . . Podle tůně vedla pěšina, po které chodívali lidé do mlýna nebo ještě dál až do města na trh, a hned pod strání byl široký pruh jemného písku, kde se slunili a koupali kluci ze vsi. Ve mlýně a ve vsi věděli, že tady mají vodníka, ale nikde se ho příliš nebál, neboť on ze zlé vůle nikomu neubližoval. . .

Kategorio C:-D. fragmento el "Život na Mississippi" de Mark Twain:

Když trochu pominula má rozmrzelost z dohrodružství s vrchním plavčíkem, začal jsem se bázně seznamovat s nejnižším hodnostářem na lodi - s nočním hlídačem. Zprvu nad mými pokusy ohrnoval nos, pojednou jsem se však odvážil nabídnout mu novou dýmku "gypsovku" a to ho obměkčilo. Dovolil mi sedat s ním u velkého zvonce na horní palubě a časem se dal se mnou do řeči. Nemohl se tomu ubránit, hltal jsem tak oddaně jeho slova a dával jsem příliš nepokrytě najevo, jak jsem poctěn tím, že si mne všímá. . . Byla to pro mne krutá rána, když jsem později zjistil, že je to obyčejný, sprostý, omezený, sentimentální, napolo přihlouplý žvanil, domorodec z illioaiské pustiny, který ještě nikde nebyl, který zhltal spoustu krváků a přisvojoval si jejich divy, až je konečně páte přes deváté vpletl do své povídačky, tu potom vykládal zelenáčům, jako jsem byl já, a to tak dlouho, až jí sám začal věřit.

T A S K O 2-a: por ĉiuj lingvaj kategorioj: Verku spritan rakonton, taŭgan por la konversaci kurso. Longeco: proksimume nia Tagiĝo-formato A/5. Kvaliton ni taksos laŭ: temo, spriteco, stilo, gramatika korekteco, vorta elekto ktp. Ne forgesu mencii, al kiu junulara lingva kategorio vi apartenas (B, C, D)! Se vi ne faris junularajn ekzamenojn, priskribu al ni kiom longe vi lernas (lernis) Esperanton kaj ni mem envicigos vin laŭ viaj scioj.

Novaj Libroj

La plej konata nuna libroeldonejo estas "Stafeto" sur Kariaj Insuloj. Ĝi daŭrigas vojon montritan siatempe de la eldonejo "Literatura Mondo" en Budapeŝto, kiu sub lerta gvidado de Vilmos Bleier sukcesis eldoni 78 Esperantajn librojn.

Unueciga rolo de la Esperanta literaturo por la lingvo, parolata en ĉiuj terpartoj kaj de ĉiuj lingvaj grupoj estas tute klara. S-ano J. Regulo Pérez transprenis do stafete la torĉon, kiu en Budapeŝto ŝajnis jen estingiĝi. En la jaro 1952 aperis la unua libro: "Kvaropo", originala poemaro de 4 skotaj aŭtoroj. Ĝi rapide vendiĝis kaj tio kuraĝigis la eldoniston. Sekvis "La bapto de caro Vladimir", versa satiro de K. H. Borovský, tradukita de T. Pumpr. En 1955 venis du novelaroj:

"El la maniko" de Reto Rossetti kaj "Koko krias jam" de Ferenc Szilagyí. Samjare aperis poemaro de Marjorie Boulton "Kontralte". La originan intencon eldoni ankaŭ malnovajn, jam elĉerpitajn verkojn, venkis amaso da novaj verkoj, kripostulantaj eniri la mondon ...

Sekvis en 1956 "Eseoj" de Gaston Waringhien kaj "La infana raso" de William Auld. Mejloŝtono fariĝis "La floroj de l' malbono" de Charles Baudelaire kiujn redaktis K. Kalocsay kaj G. Waringhien. La libro prezentas kompletan poemaron de unu el la plej interesaj poetoj. Kiel la deka libro aperis "Josefo" de Jakob D. Applebaum. Ne nur poemaroj kaj novelaroj estis eldonitaj. "La vivo de la plantoj" de P. Neergaard komencis serion de popularsciencaj verkoj. Jen kiel aspektas la eldonplano por la venonta jaro!

William Auld:	Antologio de la originala poezio (provizora titolo).
Julio Baghy:	Sonĝe sub pomarbo (versdramo)
Roger Bernard:	Topazo kaj S-ro Le Truhadek falas en diboĉon (komedio de Pagnol kaj Romains, respektive).
Marjorie Boulton:	Eroj (nova poemaro).
Stellan Engholm:	Homoj sur la tero (dua eldono tralaborita).
John Francis:	La kaldrono (romano).
Douglas B. Gregos:	Reĝo Edipo kaj Antigona (tragedioj de Sofoklo).

Gerald C. Jervis:	La mildigo de la megero (komedio de Shakespeare).
Kalmán Kalocsay:	Poemoj de H. Heine – Tutmonda sonoro (duvoluma tradukantologio de la poeziaj ĉefverkoj en la tuta mondo).
Geraldo Mattos:	Arĉoj (poemaro).
Paul Neergaard:	Esearo
Jean Ribillard:	Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud.
Reto Rossetti:	Mestizo de la mondo, kaj aliaj poemoj. - Otelo (tragedio de Shakespeare).
Ivo Rotkviĉ:	Ĉe l' rando de abismo (diverstemaj eseoj).
Raymond Schwartz:	Akvo de l' rivero (romano).
Štěpán Urban:	Nova Ezopo kaj aliaj satiroj.
Eli Urbanová:	Nur tri koloroj (poemaro).
Gaston Warinhien:	Eseoj II. Lingvo kaj vivo.

Jen multaj eminentaj nomoj kaj multaj promesdonaj librotitoloj. Ne mortos la lingvo, kie literaturo riĉas je tiaj juveloj.

Skizo pri la Esperanta Literaturo. (Recenzo) .

Vlastimil Novobilský, kultura delegito de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Junularo kaj ano de la Junulara Ekzamena Komisiono, jam plurfoje instruis en la kursoj de la Someraj Esperanto-Tendaroj pri la Esperanta literatur-historio. La manko de lernolibro lin instigis, ke li kompilu siajn prelegojn en la "Skizo pri la Esperanta Literaturo".

La libro estas plurflanke interesa. Jam tiu fakto, ke en la j. 1956 oni sukcesis eldoni Esperantan libron en nia lando, estas rimarkinda. La verko havas 74 paĝojn da teksto, fototipie multobligita, en la formato A/5. Eldonis ĝin Esperanta Junularo ĉe Domo de Kulturo en Opava. La titolpaĝon proponis kaj grafike kreis Dolfa Bartošík. La tekstojn maŝinskribis Vladimír Novotný. La tuta aranĝo estas tre neta, la tekstoj estas bone legeblaj, la eksterajo (kun kartona bindo) estas plaĉa. La prezo 20. - Kčs.

La aŭtoro elektis la fontojn por sia kompilaĵo precipe en la Enciklopedio Esperanta kaj en la verkoj de Privat, Totsche, Lapena, Kalocsay, Waringhien, Glück kaj Kořínek.

En la amplekso kaj proporcioj de la unuopaj artikoloj respeguliĝas la stato de la Esperanta libro-merkato en nia lando kaj la atingeblo de la materialo: La periodo antaŭmilita estas do prilaborita sufiĉe detale. Plej multe da loko estas dediĉita al la klasikuloj: Zamenhof, Grabowski, Kabe, Privat, Baghy, Kalocsay.....

Aliaj aŭtoroj, precipe la plej novaj, estas menciitaj pli koncize. Estas evidente - kaj tio ne estu riproĉo al la verko de Novobilský - ke la Esperanta literaturo ankoraŭ atendas sian sisteman kaj detalan prilaboron.

Tre meritplena kaj malpli dependa de la fremdaj fontoj estas ĉapitro "Kontribuo de ĉeĥaj aŭtoroj al la Esperanta literaturo", kiu sur 20 paĝoj la unuan fojon sisteme traktas tiun ĉi temon. Tamen ni sentas mankon de la analogaj artikoloj pri la slovakaj aŭtoroj en Esperanto.

Tre laŭdinde estas, ke granda parto de la artikoloj ne nur mencias la viv-datojn de la koncernata aŭtoro, liajn verkojn kaj prijuĝon de lia laboro, sed ankaŭ estas akonapanata de specimeno el liaj verkoj.

El la alia enhavo de la libro estas notindaj la jenaj ĉapitroj: "Faka literaturo en Esperanto", "La plej gravaj literaturaj revuoj", "Verda ĉaro de Julio Baghy", "Mallonge pri la Esperanta Metriko", "Mallonga listo de neogolismoj."

Per bonŝanca elekto de la materialo, larĝa kampo de la intereso kaj fidinda prilaborado de la temoj la libro fariĝis ne nur taŭga helpilo por kursanoj, sed ankaŭ interesa legaĵo.

Junularo Třebíč preparas jam la Someran Tendaron apud la valdigo de Vranov. Oni planas lingvajn kursojn, internacian medion kaj bonan veteron. La akvon por banado oni jam prizorgis.

Junularo Opava projektas unuetapan Someran Tendaron kun Junulara Seminario por la funkciuloj. La aranĝoj promesas esti bonkvalitaj, ĉar ni jam kolektis aron da kritikaj voĉoj, konsiloj, proponoj ktp. Pro manko de loko ni ne povis nun publikigi kritikan skizon, kompilitan de s-ano Jar. Mařík, kiu interalie resumis la enketon de ISET-1957 en Popelná.

Sekvu nian konstantan rubrikon ISET –1958 en venontaj numeroj!

NI KANTU!

De la Sierra Morena

Meksika popolkanto – esperantigis Jožka Cink.

/: De la Sierra Morena

venas knabino nigrookula,

estas vere ĉarmega,

amas ŝin mia koro junula:/.
Ekkantu nun sen la doloro,

ĉar per kantado, ho mia amo,

ja konsoliĝos la koro.

Esperanto en lernejoj

Redaktas Oldřich Schwetter, instruisto, Havířov I.-blok 14/67/

Dum la Esperanto-seminario en Ostrava, la 27-an kaj 28-an de oktobro 1957, kunsidis lerneja komisiono, kiu elektis min por gvidi neregulan cirkuleron "Esperanto en lernejoj". Eldoninto devis esti s-ano J. Štechr el Pardubice, kiu jam multon entreprenis, sed bedaŭrinde grandaj malfacilaĵoj baraktas lian vojon. Ĉar la tempo rapidas kaj oni ne povas plu atendi ĝis li sukcesos, interkonsentis s-anoj Kočvara, Werner kaj mi, ke la cirkulero aperados, kiel parto de Tagiĝo. - Kian celon do havos tiu ĉi rubriko "Esperanto en lernejoj"? La celo estas simpla: informi pri sukcesoj de tiuj gesamideanoj, kiuj jam penetris lernejojn, instrui tiujn, kiuj intencas tien penetri, kiamaniere tion fari, diskuti pri diversaj temoj en la kampanjo por enkonduko de Esperanto en la lernejojn, krei personajn aŭ korespondajn interrilatojn de tiuj, kiuj jam inatruas Esperanton, en la lernejoj krei personajn aŭ korespondajn interrilatojn de lernejoj Esperanto-rondetoj.

La unua tasko de la rubriko estas: ekscii kie ĉie en nia respubliko estas Esperanto instruata en diversspecaj lernejoj kaj internulejoj. Do, mi petas ĉiujn gesamideanoj kaj geinstruistojn sendu al mi ventrapide raporton pri via laboro. Skribu kiamaniere vi sukcesis penetri lernejojn kaj internulejojn por instrui tie Esperanton, kiajn spertojn vi havas, kiel sukcesprogresas via laboro kpt. Ne forgesu, ke transdonante viajn spertojn al aliaj, vi multe helpas al nia komuna celo: "Instrui Esperanton en ĉiuj lernejoj de nia respubliko. Dol helpu fosi nian sulkon.

III-a Internacia Sportkonkurso de Esperantistaj Lernejoj. /ISEL/

Kiel Pasintjare /57/ kaj antaŭpasintjare /56/ ankaŭ ĉi jare /58/ mi entreprenos ISEL-on okaze de internacia Tago de Infanoj la I-an de junio 1958.

Regularo de la konkurso estas jena :

1) Difino de la konkurso: La sportkonkurso enhavas tri elementoj (malpezatletika tribatalo):60 metra kuro, longsalto, kaj ĵeto de kriketpilketo. Ĉiu lernejo vetbatalos sur propra sportejo. La tutan matĉon organizu instruistoj de gimnastiko.

2) Sportkonkursaj kondiĉoj: Oni vetbatalas laŭ jenaj malpezatletikaj reguloj:


a) Kuro 60-metra: tempon oni mezuras per sporthorloĝoj precize je dekonono de sekundo (ekz.: 9,1 s.) La sportejo, kie oni kuros distancon 60-metran estu ebena. Se estos vento oni kuros kontraŭ ĝi.

b) Longsalto (forensalto): La saltolongon oni mezuros per sportmetraro ortangule de la saltotabulo ĝis la unua plej proksima spuro, kiun faris kiu ajn korpoparto. Oni mezuros precize je centimetroj (ekz. 412 cm). Oni saltos trifoje kaj la plej longan salton oni kalkulos por la vetbatalo. Se la saltanto transpaŝis la saltotabulon, oni ne mezuros tiun salton, sed oni kalkulos ĝin kiel jam faritan.

c) Ĵeto de kriketpilketo: La pezo de la kriketpilketo estas ĉirkaŭ 100-150 gramoj. La longon de la ĵeto oni mezuras per sportmetraro ortangule de la ĵettabulo rekte ĝis la plej proksima spuro, kiun faris la kriketpilketo. Oni ĵetas trifoje kaj la plej longan ĵeton oni kalkulos por la vetbatalo. Se la ĵetanto transpaŝos la ĵettabulon oni ne mezuros la ĵeton, sed oni kalkulos ĝin kiel jam faritan. Oni mezuros preoize je metroj kaj centimetroj (ekz. 52,36 m)

3) Aliĝiloj: Se via lernejo intencas partopreni ĉi tiun konkurson, tuj sendu simplan poŝtkarton registritan per aerpoŝto al mia adreso. Sendu ĝin vere tuj, ĉar mi volas anonci ĉi tiun internacian sportkonkurson en ĉeĥoslovakaj gazetaraj kaj radiostacio. Sciigu la oficialan nomon de via lernejo kun preciza adreso. Ne forgesu diri, ĉu vi aligas skipon de knaboj aŭ knabinoj aŭ ambaŭ skipojn. Se vi deziras iajn informojn de mi, skribu leteron kaj ne forgesu aldoni respondkuponon (se eblas). Kondiĉojn pri reprezentanto j kaj efektivigo de matĉo ni publikigos en venonta numero.

P. S. Aliaj esperantistaj redakcioj estas petataj represi ĉi tiun artikoleon pri ISEL. Tutkoran dankon.



HORIZONTALE: 1. Unua divenotaĵo. 2. metalo /r/, sorto de juna homo /r/, personalo. 3. ludo /r/, delekte bonfarta /rv/. 4. signo de ŝparemo /r/. 5. paroli per sibla kaj skua voĉo /r/, 6. agi per lango /r/, prepozicio kaŭza /rv/, 7. konsonantoj de rara prefikso, vokaloj de beno. 8. tria divenotaĵo.

VERTIKALE: A. kvara divenotaĵo. B. kreskaĵo /r, rv/, adverbo de kvant /rv/. C. signo de produktejo /r/. D. personsufikso /rv/, interjekcio de surprizo, F. parhufulo kun plata korkornaro. E. sufikso nedifinita, vokaloj de benu, subjunkcio: G. kristana instigo, ĝi kreas fervojon /r/, H. dua divenotaĵo. /r/- radiko, /rv/- renverse.

La solvitan krucenigmon sendu ĝis fino de februaro al: J. Werner, Ostrava-Kunčice, Na Lachu 6. Unu el la bonaj solvontoj ricevos libropremion.

Anoncoj

Eluzu nian servon! La anoncojn sendu antaŭ la 5-a de ĉiu monato. Unu linio kostas 1. - Kĉs. 18-jara studento de teknikumo deziras korespondi kun ĉeĥosl. junularo, speciale kun junul/in/o el Praha: Boris A. Loktev, 3. Sovetskaja ul., kv. 4, LENINGRAD S-36, USSR.

Esperanto-Rondeto en Moskva aŭtovoja Instituto deziras kontakti kolektive kaj individue kun iu ĉeĥoslovaka instituto aŭ uzino, kiu rilatas al aŭtomobila konstruado, aŭtomobilismo aŭ voja mastrumo. Adreso: USSR, MOSKVO, Leningradskoje ŝosse 108-132, Komitato de Komsomol, Esperanto-Rondeto,

"Pollando"-unuopajn numerojn po 3,50 Kĉs vi povas mendi ĉe: KNIHA n. p., cizojazyčné odd., PRAHA II., Štěpánská ul. 42.

"Pollando" – se vi deziras fariĝi abonanto en la jaro 1958, skribu tuj al: Jose Reiser, PLZEŇ, Nádražní 34. Abonpago 50,- Kčs, duonjara 25,-Kčs.

Fotografajoj de Dro Zamenhof en Bern 1913 poŝtkarta formato po 2,- Kčs- mendu ĉe: Drah. Kočvara, OSTRAVA VIII., Kamenec 251/3. •

- Esperanto rondeto en Opava kaj ĉefe s-ano Frantl kolektis por la paca alvoko de Albert Schweitzer 945 da subskriboj.

- Merite de japana esperantisto Kei Kurisu, Tokiaj laborantoj de marionetaj teatroj dramigis la fabelonde ĉeĥa verkistino B. Němcová = "Princido Bajaja", kiut?;~ nun oni kun granda sukceso ludas en tuts Japaaanlando. aldonaa ankoraŭ ke la fabelon por tiu celo sendis en Japanujcn s-ano Frantl el Opava pri kies laboro sur tiu kampo vi povis sŭ pasintjare en radia e- Nun li ricevis inviton al Ostrava televizo por tie prilabori programeron pri lia plua laboro peresperanta. La televiza disaŭdigo okazos eble fine de januaro.

TAGIĜO VOKAS ABONANTOJN:

Gajnu novajn abonantojn de Tagiĝo. Ni bezonas da ili almenaŭ 500. Ni garantias eldonon de 144 paĝoj. Eble ni eldonos pli multe. Aliĝojn kaj Kčs 12,— direktu al:

s-ano Kuzník Jar. Mendlova 21, Opava.

Ni dankas al niaj subtenantoj: J. Cink Červená Voda 10. - Kčs, Lad. Adámek, Poruba 6 . - Kčs.

Tajpis: Květa Novotná. Ilustris: K. Škovran.

Eldonis – Vydal: Dům Osvěty P. Bezruč v Opavě.